

unuakta komedio

独幕喜剧

SUBPREMO

压迫

verkis Ding Xilin

作者：丁西林

esperantigis Guozhu

— **memore al Liu Shuhe**

纪念刘叔和

e-Librigita de Elerno

nov. 2007



Pri la aŭtoro Ding Xilin(1893-1974)

Fama fizikisto, eminenta dramisto kaj aktivulo de sociaj aktivecoj en Ĉinio. 1893 naskiĝis en Taixing, Jiangsu-provinco. 1914 veturis al Britio por lerni fizikon kaj matematikon en Kembriĝo. Tiam li multe legis pri noveloj kaj dramoj en la angla, kaj estis forte influata de la dramo en la Okcidento, precipe de angla kaj franca. 1920 invitite de s-ro Cai Yuanpei, Ding Xilin revenis Ĉinion kaj instruis, kiel profesoro pri fiziko, sinsekve en Pekina Universitato kaj Centra Universitato. Kvankam li verkis nur en sia postlabora libertempo, tamen pro liaj elstaraj verkoj li estis rigardata kiel "Majstro de unuakta komedio". Lia unua komedio <Unu Verpo> publikiĝis en 1923, kaj tuj sekvis aliaj kvin unuaktaj komedioj <Kara Edzo> (1924), <Post Ebriiĝo>(1925), <Subpremo>(1926), <Blindiĝo de Unu Okulo>(1927) kaj <Aero de Pekino>(1930). Post dek jaroj, li verkis novajn dramojn <Tri Ĉinaj Dolaroj>(1939-1940), <Miaofeng-monto> (1940), <Atendi Revenon de Edzino>(1940). Post 1949 li verkis dramon

<Mirinda Meng Lijun>(1959-1961). Dramoj verkitaj de Ding Xiling karakteriĝas per lerta intrigo, implicita humoro kaj interesa spriteco. Post fondiĝo de la nova Ĉinio, Ding Xiling funkciis kiel vicministro de la Kultura Ministerio, vicprezidanto de la Ĉina Sciencpopulariga Asocio, vic-estro de la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Aliaj Landoj k.c.

S-ro Li Jianwu tiel diris, ke "Dum niaj verkado kaj ludo de dramoj estas por 'flati' al spektantoj, la dramaj verkoj de s-ro Ding Xilin konkeris spektantojn."

La unuakta komedio <Subpremo> estas unu el la plej famaj verkoj de s-ro Ding Xilin.

丁西林 (1893—1974)

著名的物理学家、杰出的剧作家、社会活动家。1893年生于江苏泰兴。1914年赴英国伯明翰大学攻读物理和数学科，其间阅读了大量的英文小说与戏剧，受到西方戏剧、尤其是英、法戏剧的熏陶。1920年应蔡元培先生之邀回国，任北京大学和中央大学物理系教授。虽然他仅只在业余时间从事剧本创作，但他以杰出的剧本被誉为“独幕剧的圣手”。他的第一个独幕喜剧《一只马蜂》发表于1923年。紧接着又陆续发表了五个独幕喜剧：《亲爱的丈夫》(1924)、《酒后》(1925)、《压迫》(1926)、《瞎了一只眼》(1927)和《北京的空气》(1930)。相隔十年后，他有感于腐败的社会，又相继写出了《三块钱国币》(1939—1940)、《妙峰山》(1940)、《等太太回来》(1940)三个剧本。他的剧作，构思巧妙，含蓄幽默，妙趣横生，具有独特的艺术风格，新中国成立后，曾任文化部副部长、中国科协副主席、中国人民对外友好协会副会长等职。李健吾先生曾说：“我们写戏、演戏是‘巴结’群众，而丁先生写的戏是征服观众。”

独幕喜剧《压迫》是丁西林最有名的剧本之一。

unuakta komedio

独幕喜剧

SUBPREMO

压迫

verkis Ding Xilin

作者：丁西林

esperantigis Guozhu

-- memore al Liu Shuhe

纪念刘叔和

(1925-12-07)

Shuhe:

Tiu ĉi skeĉo estas dediĉita al vi. Mi ne kuraĝas aserti, ĉu mi ricevis la inspiron pri la aminda temperamento de la heroo en la skeĉo de via aludo; tamen, ĝia intrigo ja naskiĝis de vi. En lasta vintro, eble vi ankoraŭ memoras, ke vi volis disiĝi de ni kaj mem lui propran ĉambron. Iuvespere, kiam ni sidis ĉe la forno kaj ekbabilis pri tio, ni ŝerce al vi parolis ke vi ne sukcesos antaŭ via geedziĝo. Ĉar luanto en Pekino devas plenumi jenajn du kondiĉojn: unue, kun garantianto; due kun edzino. Tiam min multe interesis tiu ĉi temo kaj mi diris al vi ke mi verkos skeĉon por vi. Tio okazis jam antaŭ pli ol unu jaro. Dum tiu ĉi jaro, mi multfoje deziris finverki la skeĉon, sed ne sukcesis. Nun, kiam tiu ĉi skeĉo finfine ellaboriĝis, vi jam mortis ! Miaj multaj aliaj prov-verkoj estis de vi anticipite legitaj antaŭ la publikigo. Tamen tiu ĉi verko, speciale dediĉita al vi, ne povas ricevi vian kritikon, tio ja ege veigis min.

叔和:

这篇短剧是贡献给你的。这剧里主人的一种可爱的特性，是否受了你的暗示，我不敢说，但是这剧的情节，是由你发生的。去年的冬天——大约你还记得吧——你想离开我们自己找房另住，有一天晚上，我们坐在火炉的旁边烤火，讲起这件事来，我们和你开顽笑，说你如果不结婚，你一定找不到房子。因为北京租房，要满足两个条件：一是有铺保，一是有家眷。那时我觉得这个题目很有趣味，对你说，我要替你写一篇短剧。这事已隔了一年多了。在这一年之内，多少次我想把这篇剧本写出，都没有成功。

现在这篇剧本总算勉强脱稿，但是你已经死了！以前我写的那几篇试验的作品，都曾经先由你看过，然后发表。这一篇特别为你写的东西，反而得不着你的批评，这是很令人感伤的一件事。

Tiu ĉi skeĉo estas nenio alia ol fantazio, sen "problemo", ankaŭ sen "instruo". Tamen ĝi ekhavas specialan signifon pro via morto. Ĉu vi scias, kial vi mortas? Vi suferis de epidemio. Vi mortis de muŝo. La muŝo ne mordis, sed ĉiufo je kiam vi kuŝis en hospitalo kaj viaj amikoj vizitis al vi, ili batmortigis multajn muŝojn sur via lito, via korpo kaj via glaso. Vi troviĝis en tia situacio sub prizorgo de neni, sekve, estas ne tro malprudente se ni diras ke vin mordmortigis la muŝo. Tial mi ekpensis se vi povus renkonti, dum vi serĉis lueblan ĉambron, kiel la heroo de tiu ĉi skeĉo, virinon kun simpatio, kiu "unuiĝis" kun vi por rezisti, ne nur la "Subpremon de burĝo",

sed ankaŭ ĉiujn subpremon kaj ofendon de la socio. Mi kredas, ke vi neniel mortas.

这篇短剧不过是一种幻想。没有“问题”，也没有“教训”。然而因为你的死，它倒有了特别的意义。你是怎样死的，你知道么？你的病，是瘟热病。你的死，是苍蝇咬死的。苍蝇不会咬人，但是你住在医院的时候，你的朋友每次去看你，都要在你的床上，你的身上，你的牛奶杯上替你打死好多的苍蝇。你处在那种无人看护的情境，说你是苍蝇咬死的，总不算太理智吧。因此我想到，你真的找房的时候，如果能和这剧里的主人一样，遇到那样的一个富有同情的人，和你“联合起来”，去抵抗——不但“有产阶级的压迫”——社会上一切的压迫与欺侮，我相信，你是一定不会死的。

Vi estas homo kun abunde da HUMOR, do vi certe ne ofendiĝus pro tio ke mi verkas komedion je memoro al forpasinta amiko. Mi ne estas pesimisma, tamen vi kredu ! Kiam mi finis ĉi-skeĉon kun sopiro al vi, mi sentas nur senfinan malĝojon kaj triston.

Xilin

你是一个很有humor的人，一定不会怪我写一篇喜剧来纪念一个已死的朋友。我的生性是不悲观的，然而你可以相信，我写完了这篇剧本，思念到你，我感觉到的只是无限的凄凉与悲哀。

西 林

PERSONOJ 人 物

Luanto (L) 男客人

Luintino (N) 女客人

Mastrino (M) 房东太太

Maljuna Servistino (S) 老 妈

Policano (P) 巡 警

SCENO

Malnovstila ĉina domo. Malantaŭe pordo al korto. Ambaŭflanke po pordo al aliaj ĉambroj. Interne de la ĉambro iom dekstre staras kvadrata tablo, kun kelkaj seĝoj. Sur la tablo estas tablotuko, petrollampoj kaj tetrinkilaro. Iom live ĉe la muro staras tetableto kun paro da seĝoj. Sur la apogilo de unu seĝo estas pluvmantelo, apude -- mansako. Malantaŭe live ĉe la muro staras meblo kun spegulo simila al tualeta tablo, sur kiu estas horloĝo kaj florbazo. En la ĉambro ankaŭ estas alia dekoracio, sur la muro estas belskribaĵoj kaj pentraĵoj, sed ĉio estas sufiĉe simpla, modesta.

Kiam leviĝis la kurteno, viro en kostumo el kruda lanŝtofo kaj longaj botoj pipfumas sidante sur la seĝo apud la tableto. Maljuna servistino staras ekster la pordo etendante sian manon por pruvi ĉu ankoraŭ pluvos.

布 景

一间中国旧式的房子。后面一扇门通院子，左右壁各一门通耳房。房的中间偏右方，一张方桌，四围几张小椅。桌上铺了白布，中间放着一架煤油灯及茶具。偏左方，一张茶几，两张椅子，*壁放着。一张椅背上搭了一件雨衣，旁边放着一个手提的皮包。后面的左边*墙放着一张类似洗脸架带有镜子的小桌，上面放着一个时钟及花瓶。屋内尚有其他的陈设，壁上还有一些字画，但都很简单而俭朴。

(开幕时，一个著粗呢洋服、长筒皮靴的男人坐在茶几旁边的一张椅上抽烟斗，一个老妈子立在门外，将手伸到屋檐的外边去试验有无雨点。)

S: (Eniris en la domon) Jam ne pluvas. Kial ŝii ankoraŭ ne revenas?
(prenante de la tablo kruĉon, iris al la tetableto kaj verŝis teon al la gasto)

老 妈 (走进屋来) 雨倒不下了, 怎么还不回来? (从桌上拿了茶壶, 走到茶几边代客人倒茶)

L: (Senpacience. Stariĝis) Hm, al mi unue iom da manĝaĵoj, ĉu eble?

男 客 (不耐烦, 站起) 唉, 你先弄一点东西来吃, 好不好?

S: Pretaj estas manĝaĵoj tie. Sed ni ankaŭ devas atendi ĝis reveno de la s-ino.

老 妈 东西倒有在那里, 不过这也得等太太回来。

L: Por manĝi ni devas atendi ŝian revenon?

男 客 吃东西也得等太太回来?

S: (suspiris) Jes, por manĝo ni devas atendi la s-inon, por la apartamento ni ankaŭ devas atendi la s-inon.

老 妈 (叹了一口气) 是的, 吃东西得等太太回来, 房子的事情, 也得等太太回来。

L: Do, ni atendu! Finfine tia, ĉu ŝi revenos, ĉu ŝi ne revenos. (residiĝis)

男 客 好吧, 等太太回来吧。横竖是那么一回事, 太太回来也是那样, 太太不回来也是那样。(复坐下)

S: (kapskuis) Verŝajne, nia s-ino mastrino ne konsentos ludoni al vi la apartamenton.

老 妈 (摇头) 看那样子, 太太不像肯答应把这房子租给你。

L: Ne konsentos? Kial ŝi akceptis mian mendpagon?

男 客 不把这房子租给我? 谁叫她受我的定钱?

S: Tion ja faris nia f-ino, sed ve! Temperamento de nia s-ino ankaŭ estas tro stranga, ĉu s-ro kiel vi alportus ĝenon al ni? Fakte, se en la domo estas viro, oni sentos pli da sekureco en noktmezo.

老 妈 是的, 那只怪小姐不好。其实——唉——太太的脾气也太古怪了。像你先生这样的人, 有甚么要紧? 深更半夜, 屋里有一个男人, 还可以有个照应。

L: Ĉu iam venis luanto por tiu ĉi apartamento?

男 客 这房子以前有人租过没有?

S: La apartamento estis vaka jam dum pli ol unu jaro, sed ĝis nun ankoraŭ neludonita.

老 妈 这房子已经空了有一年多了, 也没有租出去。

L: La ĉambroj ne estas malbonaj, kial venis neniun luanto?

男 客 这房子并不坏，为甚么没有人要？

S: Neniu? Ĉiu, kiu vidis tiun ĉi apartamenton, laŭdis kaj volis lui. Jen la ĉambroj estas puraj kaj helaj. Kaj antaŭe troviĝas tiel bona ĝardeno.

老 妈 没有人要？谁看了都说这房子好，都愿意租。这房子又干净，又显亮，前面还有那样的一个花园。

L: Sed kial neludonita dum jaroj?

男 客 这样说为甚么一年多没有租出去呢？

S: Ho, s-ro, vi ne estas fremda homo, do estas ne grave, se mi konfidu al vi. Sciu, kion nia s-ino plej ŝatas, estas ludo de maĝango, ĉiutage de la mateno ĝis la vespero ŝi ne estas hejme. Restas nur nia f-ino kaj mi, duopo. Kiam venas luanto, akceptas nia f-ino. Al tiu, kiu havas familianojn, tuj ĉe la mencio pri edzino kaj infano, nia f-ino forsendis lin rifuze. Nia f-ino donis konsenton nur al tiuj luantoj sen familianoj. Tamen, kiam nia s-ino revenis, eksciinte ke la luanto estas sen familianoj, ŝi tuj lin rifuzis for. Tiel do, por ne paroli pri unu jaro, mia opinio, eĉ post dek jaroj la ĉambroj restos ankoraŭ vakaj neludonitaj.

老 妈 你先生也不是外人，告诉你也没有甚么要紧，你知道，我们的太太爱的就是打牌，一天到晚在外边。家里只有我和小姐两个人。有人来看房，都是小姐去招呼。有家眷的人，一提到太太、小孩，小姐就把他回了。没有家眷的人，小姐才答应，等到太太回来，一打听，说是没有家眷，太太就把他回了。这样不要说一年，就是十年，我看这房子也租不出去。

L: Kio? Tia afero iam okazis?

男 客 怎么，像这样的事，以前已经有过么？

S: Eĉ multfoje! Kaj ĉiufoje sekvis kverelo inter niaj f-ino kaj s-ino. Ordinare nia f-ino ne faris decidon. Sed ĉifoje ŝi mem decidis akcepti vian mendpagon, tiel okazas la ĝeno.

老 妈 也不知有过多少次。每回租房，小姐都要和太太吵一次，不过平常小姐不敢做主，这一次她做主受了你先生的定钱，所以才生出这样的事来。

L: Se ŝi decidis pli frue, la apartamento jam delonge estis luigita.

男 客 她如果早做主，这房子老早就租了出去。

S: Jes, sed ordinare la rifuzitoj foriris, ili ne estas kiel vi, tiel...

老 妈 是的，不过平常租房的人，听说房子不能租给他们，他们也就没有话说，不像你先生这样的.....

L: Stranga? ĉu? Jes. Via s-ino estas tro stranga. Ankaŭ mi mem tro stranga.

Ĉifoje kontraŭstaras du stranguloj, do la afero fariĝas malfacila. Tamen, ĉi tiu domo ankaŭ plaĉas al mi, precipe la malgranda ĝardeno.

男 客 古怪，是不是？是的，你们太太的脾气太古怪了，我的脾气也太古怪了，这一回两个古怪碰在一块儿，所以这事就不好办了。不过我也觉得这房子不坏，尤其是前面的那个小花园。

S: Laŭaspekte, s-ro, vi certe estas kvietema, ĉi tie aŭdiĝas neniom da bruoj ĉiutage kaj estas tiel proksime de via oficejo, sekve...sekve mi cerbumadis por vi...

老 妈 看你先生的样子，一定也是爱清静的。这里一天到晚听不到一点嘈杂的声音，离你先生办事的地方又近，所以.....我曾在那里替你先生想.....

L: Kion?

男 客 你替我想甚么？

S: ...vi prefere diru ke vi havas edzinon, kiu venos nur post tagoj, tiel nia s-ino konsentos ludoni al vi la apartamenton.

老 妈就说你先生是有家眷的，家眷要过几天才来，这样一说，太太一定可以答应把这房子租给你。

L: Do, sed post tagoj neniu edzino venos. Kion fari?

男 客 好了，如果过几天没有家眷来，怎样？

S: Post tagoj nia s-ino jam ne rifuzos, ĉar ŝi vidis vin bonkonduta.

老 妈 住了些时，太太看了你先生甚么都好，她也就不管了。

L: Ne, ne ! Homo sen edzino ne estas krimulo, kial ne rajtas lui domon?

男 客 不行不行，一个人没有结婚，并没有犯罪，为甚么连房子都租不得？

S: Nu, mi tiel pensis stulte nur pro tio ke mi opinias vin certe tre afliktita, ĉar vi ja tiel ŝatas la apartamenton, sed ne sukcesis ĝin lui. Ho, mi ja estas senprudenta. -- Aŭ, jen probable revenas la s-ino mastrino. (iris ĝis la pordo, kaj laŭte vokis) Ĉu s-ino?(responde)

老 妈 喔，我不过觉得你先生这样的爱这房子，如果租不成功，心里一定不舒服，所以那么瞎想罢了，我原是不懂事的。——啊，这大概是太太回来了。（走到门口，高声）是太太么？

（外面答应。）

Ho, jes, ĉi tie. (eliris. Ankaŭ la luanto stariĝis. Post momento, eniris la mastrino-luigantino de la malantaŭa pordo. La servistino ŝin sekvis.)

老 妈 是的，在这儿。（走出）

（客人也站了起来。少停，房东太太由后门走进，老妈跟在她的后面。）

M: Pardonu ! Ke vi atendis longan tempon !

房 东 对不住，劳你等了。

L: Pardonu pro mia ĝeno ! Mi ja petis ke via servistino ne vokis vin, sed ŝi ne aŭskultis min.

男 客 我对你不住，打搅了你。我叫你们的老妈子不要去惊动你，她没有听我的话。

M: Ne grave. (prenis monbileton el leda monujo) Aĥ, jen via mendpago ! reprenu !

房 东 那没有甚么。（从一个皮夹里拿出一张票子）啊，这是你先生留下的定钱，请你收起来。

L: Aĥ, pardonu ! Mi venas por loĝi, ne por repreni mian mendpagon.

男 客 啊，对不住，我今天是到这边来住宿的，不是来讨定钱的。

M: Kio? Hieraŭ mi jam klarigis al vi ke mi ne povas ludoni al vi la apartamenton, ĉu ne?

房 东 怎么？昨天我不是对你说明白了么，说这房子不能租给你？

L: Aĥ, jes, vi bone klarigis.

男 客 啊，是的，你说的很明白。

M: Sed kial hodiaŭ vi sendis vian pakajon ĉi tien? Kion vi volas?

房 东 那么今天你还叫人把行李送到这儿来是甚么意思？

L: (kun granda ĝojo) Ĉar tio, ke mi ne venu, estas via parolo, sed ne mia. Mi ne konsentis ke mi ne venas, ĉu mi konsentis?

男 客 （高兴得很）因为叫我不来是你说的，不是我说的，我并没有答应你说不来。我答应了没有？

M: (iom post iom sentas malagrablon) Mi ne bone komprenas vin. Ŝajnas al mi, ke laŭ via opinio, la luigo de la apartamento nur vi rajtas decidi, ĉu?

房 东 （渐渐感到不快）你这话我真不大明白，你的意思，好像是说这房子的租不租要由你答应，是不是？

L: Nu, ne. La luigon kompreneble nur vi rajtas decidi. Sed post la luigo nur mi rajtas decidi. Sciu, nun la problemo ne estas pri luigo, sed pri nuligo.

男 客 喔，不是，这房子的租不租，自然是要由你答应。不过，既把房子租了给我，这房子的退不退，就得由我答应。你知道，现在这房子不是租不租的问题，是退不退的问题。

M: (iom post iom koleriĝis) Kiam mi konsentis la luigon al vi?

房 东 （渐渐生起气来）我这房子是几时租给你的？

L: Ĉar vi akceptis mian mendpagon, tio signifas konsenton al mi.

男 客 你既受了我的定钱，这房子就算租了给我。

M: Diablo! Kiam mi akceptis vian mendpagon? Ja mia filino, senprudenta !
房 东 真是碰到鬼，我几时受你的定钱？那是我的女儿，她不懂事。

L: Senprudenta? Ŝi ne estas infano.

男 客 不懂事？她又不是一个小孩子。

M: Nu, jam ne sensencaĵon. Ne estas tio, ke mi luigas. Mi nur volas luanon kun edzino. Se vi havas edzinon kunloĝantan, mi donos al vi la apartamenton. Senmalfacile.

房 东 喔，现在这些废话都不必讲，我这房子并不是不租，我是要租一个有家眷的人，如果你先生有家眷来同住，我这房子租给你，我没有话说。

L: Kia diro! Kiam vi luigas la ĉambron, ĉu vi klarigis tion? Ĉu mi trompis vin?

男 客 你这话说的毫无道理，你租房的时候，说明了要家眷没有？我骗了你没有？

M: (Ŝanĝi sin en paca maniero) Mi ne klarigis luigante. Sed hieraŭ mi jam diris al vi ke en nia hejmo estas neniu viro...

房 东 （改用和平的方法）租房的时候没有说，可是我昨天已经对你先生说过，我们家里没有一个男人.....

L: (Ŝin haltigi) Aj, aj, mi demandu al vi ĉu estis viro kiam vi luigas vian apartamenton? Kial vi ekmemoras, nur ĉi-momente?

男 客 （停止她）唉，唉，我问你，你租房的时候，你家里有男人没有？为什么现在才想到？

M: Tute neklarigeble kun vi. Mi ne havas tempon por diskuti.

房 东 你这人一点道理不讲，我没有这许多工夫来和你争论。

S: (interpacige) Nu, s-ino, hodiaŭ jam estas malfrue, kaj pluvas. Estas ne opor tune ke tiu s-ro trovu alian ĉambron. Ĉu eble lasi lin provizore loĝi ĉi tie dum nokto kaj morgaŭ trovu alian elirejon?

老 妈 （想做和事佬）喔，太太，今天时候也不早，天又下雨，现在要这位先生另外找房子，也不大方便，可不可以让这位先生暂时在这儿住一宵，明天再想旁的法子。

L: (obstine) Neeble ! La rezono estas tia. Se mi ne luis la ĉambrojn, mi tuj foriru! Se vi jam akceptis mian mendpagon, la apartamenton nepre disponu mi !

男 客 （固执）不行！这话不是这样讲，如果我不租这房子，我即刻就走，既是受了我的定钱，这房子就非租我不可！

M: Do mi diru al vi: hodiaŭ vespere vi nepre foriru !

房 东 那么我告诉你，你今晚非走不可！

L: (rikane) Hm ! (eksidiĝis)

男 客 （冷笑了一声）喔！（坐了下来）

M: (paŝis antaŭ lin) Ĉu vi foriru?

房 东 （站到他的面前）你走不走？

L: Ne !

男 客 不走！

M: Wang-ma (la nomo de la servistino), venigu la policanon !

房 东 王妈，去把巡警叫来。

S: Nu, s-ino !

老 妈 喔，太太！

M: Alvoku la policanon !

房 东 你去叫巡警来。

L: Kio koncernas la policanon? Li ankaŭ devas aŭskulti rezonadon.

男 客 巡警来了又怎样？巡警也得讲理呀？

S: S-ino, mi...

老 妈 太太，我想.....

M: Mi ordonas ke vi venigu la policanon, ĉu vi aŭdis? -- ĉu vi ne iros?

房 东 我叫你去叫巡警去，你听见了没有？——你去不去？

S: Jes. (eliris tra la malantaŭa pordo)

老 妈 好吧。（由后门走出）

M: Tuj, rapide ! (eliris tra malantaŭa pordo kun brufermo de la pordo post si)

房 东 要他即刻就来！（由后门走出，用力将门一关）

L: (senrimede. Palpe eligis tabaksakon kaj pipon, sed la tabakfolioj elĉerpiĝis. Prenis de leda teko tabakujon. Malfermis ĝin, plenigis la tabakujon, poste la pipon, ĝuste volonte ekfumi li aŭdis frapojn. Krudvoĉe) Eniru ! (restis kun dorso al la pordo)

男 客 （没有了办法。袋里摸出烟包和烟斗，包里的烟又完了，从皮包里取出一个烟罐，开了一罐新烟，先把烟包装满了，然后装了烟斗。正想抽烟的时候，忽然来了敲门的声音。厉声的）进来！（仍然背了门立着）

N: (puŝmalfermante la pordon, leĝere eniris. Kun pluvmantelo sur korpo, malgranda ledsako en unu mano, kaj ombrelo en alia mano. Enirinte la ĉambron, ŝi ekparolis kvazaŭ nehaltigeble) Aĥ, pardonu! Ekskuzu min !

女 客 （推开门，轻轻走进。身上著了一件雨衣，一手提了一只小

皮包，一手拿了一把雨伞。一进门就开了口，一开了口就有不能停止之势）啊！对不起，请你原谅。

(la luanto rapide sin turnis, nur tiam li ekvidis, ke eniris tia homo)

（男客人急转过身来，这时他才看见进来的是这样的一个人。

N: Estas senĝentile, mi scias, sed mi ne havas alian rimedon. Via pordo ne estas fermita. Mi frapis kelkfoje, sed neniu respondis, do mi eniris.

女 客 这是很无礼的，我知道，但是我没有办法，你们的大门没有关，我一连敲了好几下，都没有人答应，所以只好一直走进来。

L: (Ankoraŭ kun kolero, sed ne forgesis demeti la pipon al la tablo) Pro kio vi?

男 客 （气还未平，但没有忘记把衔在嘴里的烟斗拿下来放在桌上）你有什么事？

N: Mi? Mi venas labori al la Kompanio Dacheng. Ĝus de Pekino. Per trajno de la tria horo ptm. sed atingis nur je la sesa. 90 lioj da veturado daŭris du kaj duonan horojn. jen ! Nun mi devas trovi loĝejon. Ĉe stacidomo mi pridemandis kelkajn lokojn. mi jam vizitis tri aŭ kvar adresojn, sed neniu taŭgas. Oni diris ke ĉi tie estas vaka ĉambro...

女 客 我？我是到这边大成公司做事来的。今天刚从北京来，下午三点的车子，直到六点钟才到，九十里路，走了两个半钟头，你看！现在我要找一个住宿的地方，在火车站上，我打听了几个地址，一连走了三四家，都没有找到一间合用的房子。有人告诉我，说这边还有几间空房.....

L: (Trovis sin antaŭ rivalulino) Ah, vi volas lui ĉambro !

男 客 （遇到了对头）啊，你是来租房的！

N: Jes. Ĉu la ĉambro ankoraŭ estas libera?

女 客 是的。不知道这边的房子租出去了没有？

L: (kun malmola koro) Malfortuno ! La ĉambro estas luigita antaŭ momento.

男 客 （狠心的回答）你的运气不好，这房子刚刚租出去。

N: Ha, malfortuno. Vere malfortuno por mi ! Tia vetero. Malbona kampa vojo. Rigardu, malsekiĝis mia vesto tutkorpe kaj laciĝis ambaŭ piedoj (suspiris) Ve, ĉu mi povus iom ripozi sur via seĝo?

女 客 啊，你说我运气不好，我的运气可真不好。碰到这样的天气，这乡下的路又不好走，你看，我一身的衣服都打湿了。两只脚步得发酸。（叹了一口气）唉。我可以借你们的凳子坐了歇一会儿么？

L: Pardonu, sidiĝu ! (tute sen kolero)

男 客 对不起，请坐。（气全没有了）

N: (demetis sakon kaj ombrelon) Dankon ! (Eksidiĝis sur la seĝo apud la tableto, rigardis ĉirkaŭen)

女 客 （放下皮包、雨伞）谢谢你。（坐在茶几里边的一张椅上，向四边观察房里的一切）

L: (ekinteresiĝis, sidiĝis sur la seĝo apud la tablo) Ĵus vi diris ke vi venas labori al la Kompanio Dacheng, sed kio estas via ofico?-- Ah, eble mi ne devas demandi.

男 客 （引起了趣味，坐在方桌旁的一张小椅上）刚才你说你是到大成公司来做事的，不知道在那边担任的甚么事？——啊，也许我不应该问。

N: Ne devas demandi? Kial? Tio ne estas sekreto. Antaŭ du semajnoj publikiĝis en ĵurnalo anonco ke oni volas dungi sekretarion. Tiu anonco ja aperis preskaŭ en ĉiuj ĵurnaloj kaj laŭ mia supozo, ankaŭ vi legis.

女 客 不应该问？那有甚么？这又不是不可以告诉人的事。前两个星期，他们在报上登了一个广告，要聘请一位书记。那个广告，甚么报上都有，我想你一定看到的。

L: (kapjesis)

（男客点了一点头。）

N: Lastavendrede, ili publikigis alian anoncon en ĵurnalo ke " la sekretario de nia kompanio jam estas dungita, kaj ni petas pardonon ke ni ne respondos al ĉiuj rekomendoj de la parencoj kaj amikoj". Ĉu vi vidis la anoncon?

女 客 上星期五，他们又在报上登了一个启事，说“敝公司拟聘书记一席，现已聘定，所有亲友寄来荐书，恕不一一作复，特此声明。”这个启事，你看见了没有？

L: (Rekapjesis)

（男客又点了点头。）

N: Tiu dungita sekretario estas mi. Ekster via imago, ĉu ? -- Vi ne atendis, ke sekretario estas virino, ĉu?

女 客 那位聘定的书记就是我。你没有想到吧？——你没有想到是一个女人吧？

L: Jes, vere.

男 客 这倒没有想到。

N: (fiere) Sed nun, kion fari? Pensu por mi, postmorgaŭ mi jam laboros en

la Kompanio. Sed ĝis nun mi ne trovis por mi la loĝejon. Ekde la duono post la sesa mi iradis, senĉese, por diri veron, mi eĉ nenion manĝis. (stariĝis, iom ordigis sian veston paŝis al la spegulo kaj rigardis)

女 客 (得意的很) 不过现在怎么办呢? 你替我想想, 后天就要到公司里去接事, 现在连住的地方还没有找到! 从六点半钟一直到现在, 就没有停脚。不瞒你说, 我连饭还没吃呢。(起身整理了一回衣, 走到镜子的前面照脸)

L: (kun verŝajna simpatio) Manĝis nenion? Kiel eble? Verŝajne je tio mi povas helpi al vi. (stariĝis kaj verŝis tason da teo)

男 客 (好像很同情的样子) 饭还没有吃? 那怎么行? 这一层 说不定我或者可以帮助你。(起身倒了一杯茶)

N: Dankon! Mi nur diris, sed ne por tromp-akiri manĝaĵon.

女 客 谢谢你, 我不过是告诉你。我不是来骗饭吃的。

L: Nu, pardonu! -- Do, unue tason da teo!

男 客 喔, 对不起! ——好, 请先喝一杯茶吧。

N: Dankon! (residiĝis)

女 客 谢谢。(复坐原处)

L: (preninte el poŝo cigaredujon) vi ne fumas?

男 客 (袋里摸出纸烟盒) 你不抽烟吧?

N: Mi ne fumas. Sed mi ne oponas alies fumadon. (trinkis teon)

女 客 我不抽烟, 不过我并不反对旁人抽烟。(喝了一口茶)

L: Dankon. (reprenis cigaredujon. reprenis pipon. sinturnante por ekfumi)

男 客 谢谢你。(放回烟盒, 收了烟斗, 背转了身, 燃火抽烟)

N: (ekpalpis sian piedon) Ho, ĉielo! rigardu, ĉu miaj piedoj ankoraŭ ŝajnas homaj...

女 客 (摸自己的脚) 喔, 天呀! 你看我的这双脚, 还像是人的脚么?

L: (rapide turnis sin) Kio?

男 客 (急转过身来) 怎么样?

N: Ne nur akvo, sed eĉ koto eniĝis.

女 客 不仅是水, 连泥都走进去了!

L: (asidue) Malbonege! Ĉu vi deziras ŝanĝi ŝtrumpojn? Se jes, mi povos iri eksteren.

男 客 (殷勤起来) 那真糟。要不要换袜子? 如果要换袜子, 我可以走到外边去。

N: Dankon. Mi ne ŝanĝos. Eĉ se jes, estas nenecese peli vin eksteren.

女 客 谢谢你，我不要换袜子，就是换袜子，也用不着把你赶到外边去。

L: Ne grave, se vi ne kunportas, mi povas pruntedoni al vi paron da ŝtrumpoj.

男 客 不要紧，如果袜子没有带，我还可以借你一双。

N: Dankon pro via afablo. Sed kio utilas? Finfine mi iros en akvo.

女 客 谢谢你，你的好意我很感激，不过换它有甚么用处？反正是要到水里走去的。

L: Iros en akvo? --- Kial iros en akvo?

男 客 要到水里走去？——干么要到水里走去？

N: Kion mi povus fari se ne iros en akvo? Tiel obskure, suririnte la straton, ĉu mi povus distingi akvon aŭ vojon?

女 客 不到水里走有甚么办法？这样漆黑的天，一到街上，你还分得出哪里是水哪里是路来么？

L: (iom pensis)

(男客若有所思。)

N: (denove trinkis. Veis. Stariĝis por adiaŭi) Ah, pardonu pro mia ĝenado ! (preninte siajn sakon kaj ombrelon, volas eliri)

女 客 (又喝了一口茶，叹了一口气，起身告辞) 啊，打搅了你，对不住得很。(拿了皮包、雨伞，预备走出)

L: (haltigante) Momenton! Ne hastu ! --- Ĵus vi diris ke vi volas lui ĉambron , ĉu?

男 客 (阻止她) 不用忙，再歇一会儿。——刚才你说，你是要租房的，是不是？

N: (turni sian vizaĝon al li) Kio? Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas kion mi diris?

女 客 (面向了他) 怎么，我说了半天，你还没有听懂么？

L: Jes, mi komprenas. Sed... ve! Ĉu plaĉas al vi tiuj tri ĉambroj?

男 客 听是听懂了。不过.....唉，你看这三间房子怎么样？

N: Kio? Ĵus vi diris ke ili jam estas ludonitaj, ĉu ne? (demetis sian sakon)

女 客 怎么，你不是说已经租出去了么？(放下皮包)

L: Jes, jam ludonita, sed eble oni povus transluigi al vi.

男 客 租是租出去了，不过也许可以让给你。

N: (Ĝojiĝis) Al mi? Vere? (demetis la ombrelon)

女 客 (高兴起来) 可以让给我？真的么？(放下雨伞)

L: Nature, vere ! (reverŝis por ŝi tason da teo)

男 客 自然是真的。（又替她倒好了一杯茶）

N: (sidiĝis. Akceptis teon) Dankon. Sed kial al mi? Ĉu estas tiel, ke vi ne luigos al la alia homo se mi volas lui?

女 客 （坐下，接了茶）谢谢。不过为甚么可以让给我？是不是这房子如果我愿租你就可以不租给那个人？

L: (kapneis)

（男客摇头。）

N: Nu, alie vi ĵus mensogis. Ĉu la apartamento estas ankoraŭ ne ludonita?

女 客 不然，你刚才说的是句谎话，这房子就没有租出去？

L: Ne, mi diris la veron. La apartamento jam estis ludonita. Eĉ nun, ankaŭ ludonata al la sama luanto. Mia diro ke oni povas transluigi al vi, signifas tion, ke la luanto memvole transluigos al vi.

男 客 不，我说的是实话。这房子是已经租出了。现在也不是不租给那个人。我说可以让给你，是说已经租好这房的那个人，自己愿意让你。

N: Mi ne komprenas. Kial tiu homo memvole transluigos al mi? Li eĉ neniam vidis min, kial volonte transluigos al mi?

女 客 那我可不明白。为甚么那个人愿意把房子让给我？他连见都没有见过我，为甚么要把房子让给我？

L: Tio ne estas via afero.

男 客 那你不用管。

N: Ĉu la domo estas fantomfrekventata?

女 客 这房子闹鬼不闹鬼？

L: Ho, ĉu vi timas fantomon?

男 客 怎么，难道你怕鬼么？

N: Nu, mi ne timas. Mi konjektas ke eble tiu luanto timas fantomon.

女 客 喔，我是不怕鬼的，我说也许那个人怕鬼。

L: Nu, ankaŭ tiu homo ne timas. --- For la fantomon! Lasu nin rigardi la ĉambrojn, ĉu bone? (deprenante lampon de la tablo kaj kondukas ŝin) jen dormoĉambro (malfermis pordon de la dekstra muro, lasis ŝin eniri) kun pajla tegmento, cementa planko, moderna lito, pretaj litaĵoj. Ekster la fenestro estas malgranda ĝardeno, de frumatene aŭdiĝis birdkantoj. Tage sunradioj pleniĝis en la tuta ĉambro kun levigita kurteno.

男 客 喔，那个人也是不怕鬼的。——不管有鬼没有鬼，让我们来看看房子，好不好？（从桌上拿了灯引她看房。这是一间睡房。开了右壁的门，让她走进）芦苇的顶篷，洋灰地，洋式床，现成的铺盖。

窗子外面是一个小小的花园。一清早就可听到鸟的声音。白天撩开窗帘，满屋里都是太阳。

(la luanto retroiris. Li rekondukis ŝin al dekstra ĉambro)

(女客人走出。他又把她引到右边的耳房。)

L: Ĉi tie ankaŭ estas dormoĉambro kun litaĵoj kaj mebloj pretaj. Ampleksas same kiel la alia ĉambro, nur malpli hela. Se sola homo loĝas, ĉi tiu taŭgas kiel dormoĉambro kaj tiu --- legoĉambro.

男 客 这边也是一个睡房。铺盖家具也都是现成。房间的大小，和那边一样。就是光线差一点。一个人住的时候，这里可以做睡房，那边可以做书房。

(la luantino eliris).

(女客人走出。)

L: Kaj meze kiel salono, kie povas manĝi aŭ akcepti gastojn. (demetinte la lampon) La apartamento estas pura kaj hela. Aŭdiĝis neniu bruoj tuttage kaj, proksime de via oficejo. Ho, laŭ mia opinio, nenie vi povos trovi pli bonan.

男 客 中间可以吃饭会客。(放下灯)这屋子又干净，又显亮，一天到晚，听不到一点嘈杂的声音。这里离你办事的地方又近。我看这房子是于你再合式没有了。

N: Kiom da lupago resume por la tri ĉambroj? (sidiĝis)

女 客 这三间房子租多少钱? (坐下)

L: Ho, sufiĉe malkara: nur kvin juanoj.

男 客 喔，便宜得很。这样的三间房子，只租五块钱一月。

N: Vere, la ĉambroj ne estas malbonaj, ankaŭ la pago ne kara. (post momento) Ĉu oni vere povas transluigi al mi?

女 客 房子倒不错，房价也不贵。(想了一想)这房子真的可以让我吗?

L: Kompreneble jes. Kial mi trompas vin?

男 客 自然是真的，为甚么要骗你?

N: Tamen estas neeble, ke mi enloĝu jam ĉi-nokte, ĉu?

女 客 不过今晚就来住，总不行吧?

L: Jes, jes! (kvazaŭ subite ekpensis ion) Sed. momenton -- ĉu vi geedziĝis?

男 客 行，行。(好像忽然想起一件事来)不过——你结了婚没有?

N: (eksaltis. Kun ŝveligita brusto kaj starigitaj brovoj) Kio?

女 客 (跳了起来，挺了胸脯，竖起眉毛)什么?!

L: (ripetfoje) Ĉu vi geedziĝis?

男 客 (还要补一句)你结了婚没有?

N: (ekkoleris) Kiel sensenca demando !

女 客 （怒了）你这话问的太无道理！

L: Sensenca?

男 客 太无道理？

N: Absoluta ofendo !

女 客 简直是一种侮辱！

L: (Ĝojiĝis) "Ofendo". Ho jes, tute prave ankaŭ mi tiel diris. Sed nun la plej grava afero por la luiganto verŝajne estas tio, ke li volas scii antaŭ ĉio ĉu vi jam geedziĝis.

男 客 （高兴起来）“侮辱”，对了，一点都不错，我也是这样说。但是现在有房出租的人，似乎最重要的是先要知道你结婚没有。

N: Je kio koncernas vin mia geedzeco?

女 客 我结婚没有，干你什么事？

L: Jes, tute prave. Je kio koncernas mia geedzeco ilin? Sed ili persiste demandis, ĉu vere strange?

男 客 是的，一点都不错，我结婚没有，干她们什么事？可是她们一定要问，你说奇怪不奇怪？

N: Mi tute ne komprenas vin.

女 客 我完全不懂你的意思。

L: Kiu diris ke vi komprenas? Nature vi ne komprenas. Sed ne estu tro senpacienca. Mi diru al vi kaj vi tuj komprenos. -- Ĵus vi diris, ke vi venas labori en la Kompanio Dacheng, ĉu ?...

男 客 谁说你懂？你自然不懂我的意思。不过你不要性急，让我告诉你，你就会懂。——刚才你说，你是到这边大成公司来做事的，是不是？

N: Vere malbona memoro! Kial vi tiel rapide forgesis ĵus diritan mian parolon?

女 客 你这人的记忆力真坏，怎么刚说过了的话，即刻就忘了。

L: Ne koleru. Mi nur volas sciigi al vi ke mi venas ankaŭ por labori en la Kompanio Dacheng.

男 客 不要生气。我不过是告诉你，我也是到这边大成公司来做事的。

N: Ankaŭ vi?

女 客 你也是到大成来做事的？

L: Jes. Ekster via atendo, ĉu?

男 客 是的。你没有想到吧？

N: Kio vi estas en Dacheng?

女 客 你在大成做什么事?

L: Inĝeniero.

男 客 我在这边当工程师。

N: Do vi ne estas la luiganto?

女 客 这样说,你并不是这里的房东?

L: Kiu diris ke mi estas la luiganto? Ĉu mi diris? Ĉu mi aspektas la luiganto laŭ via opinio?

男 客 谁说我是这里的房东?我说了我是这里的房东没有?你看我的样子,像一个房东么?

N: (konkure) Ah, mi komprenas! Vi estas luanto. Vi luis la apartamenton, sed nun vi opinias ĝin ne konvena kaj vi volas nuligi vian mendon.

女 客 (抢着说)啊,我知道了!你是这里的房客!这三间房子是你租的,现在你觉得不合式,想把它退了。

L: Nuligi? Kiu diris ke mi volas nuligi?

男 客 想把它退了!谁说我想把它退了?

N: Sed vi ĵus diris ke la apartamenton oni povas transluigi al mi, ĉu ne?

女 客 刚才你不是说这房子可以让给我的么?

L: Jes, tion mi diris. Sed neniam pri nuligo.

男 客 是的,我是说可以让,没有说要退。

N: Mi estas despli konfuzita. Kial vi konsentas transluigi se vi ne volas nuligi?

女 客 那我更加不明白了,你既不想退,为甚么要让呢?

L: Ĉu vi vere ne komprenas?

男 客 你真的不明白么?

N: Jes. Vere. (sidiĝis)

女 客 真的不明白。(坐下)

L: Ĉar -- mi vidis ke vi...Nu, ne! Ĉar la mastrino ne konsentas luigi al mi.

男 客 因为——我看了你.....喔,不是,因为房东不肯租给我。

N: Kial ne konsenti?

女 客 为甚么房东不肯租给你?

L: Ah, ĝuste pro la geedzeco. Nun ni revenas al la ĉefa temo. Antaŭ semajno mi vizitis ĉi tien kaj renkontis la fraŭlinon-luigantinon. Explore ŝi demandis min longe pri tio ĉu mi havas patrinon aŭ infanon, aŭ gefratojn k.s., nur ĝis kiam mi klare sciigis al ŝi, ke mi estas fraŭla, ŝi sentis grandan kontenton kaj tuj konsentis luigi la apartamenton al mi eĉ ne menciinte pri

la prezo.

男 客 啊，就是这婚姻的问题。现在我们讲到题目上来了。一星期以前，我到这里来看房子，碰到了房东小姐。一见了她，她就盘问我，问我有没有老太太，有没有小孩子，有没有兄弟姐妹，直等到我明明白白地告诉了她我是没有结过婚，她才满了意。连房价也没有多讲，她就答应了把房子租给我。

N: Ĉu vi komprenas? Ĝi sciis ke vi estas inĝeniero. Ĝi deziras geedziĝi kun vi certe !

女 客 懂么？她一定知道了你是一个工程师，她想嫁给你！

L: Ĉu vere? Tion mi ne imagis.-- Hieraŭ posttagmeze, kiam mi venas ĉi tien, la s-ino mastrino sciigis al mi ke ŝi ne povas luigi la ĉambron al mi, se mi ne havas edzinon. Ĝi bone scias ke mi ne havas edzinon, tamen ŝi forpelas min per tiu ĉi preteksto. Kiel malice!

男 客 真的么？这我倒没有想到。——昨天下午，我到这里来的时候，她们老太太告诉我，说如果我没有家眷来同住，她这房子不能租给我。她明明知道我没有家眷，她把这话来要挟我，你说可恶不可恶？

N: Kial ŝi ne luigas al homo sen edzino?

女 客 为甚么没有家眷来同住，这房子就不能租给你？

L: Mi ne scias. Ĝi diris ke neniu viro troviĝas en ŝia hejmo.

男 客 我不知道啊。她说她们家里没有男人。

N: Ridinde.

女 客 笑话。

L: Simple ofendo, ĉu?

男 客 这简直是一种侮辱，是不是？

N: Jes.-- Kio poste?

女 客 是的。——后来怎么样？

L: Poste mi donis lecionon al ŝi.

男 客 后来我把她教训了一顿。

N: Ĉu ŝi jam komprenis la rezonon?

女 客 她明白了这个道理没有？

L: Kompreni? Mi atentigu al vi, ke por homo pli ol 40-jara jam ne estas loko en lia cerbo por novaj rezonoj, ĉar la malnovaj jam ŝin plene okupis.

男 客 明白了这个道理？一个人一过了四十岁，他脑子里就已经装满了旧的道理，再也没有地方装新的道理，我告诉你。

N: Sed nun, kion fari ?

女 客 现在怎么样？

L: Nun? Nun mi ne foriru !

男 客 现在? 现在我不走!

N: Sed ŝi?

女 客 她呢?

L: Ŝi? Ŝi venigos la policanon.

男 客 她? 她去叫巡警。

N: Policanon? Kion li faros?

女 客 叫巡警? 叫巡警来干甚么?

L: Min forpeli.

男 客 叫巡警来撵我!

N: Ĉu vere?

女 客 真的么?

L: Kial mi trompas vin? Se vi ne kredas, rigardu, baldaŭ venos la policano.

男 客 为甚么要骗你? 你如果不相信, 等一会儿巡警就要来, 你自己看好了。

N: Tio estas vere interesa. Sed kion vi faros se la policano vere pelos vin ?

女 客 这倒是怪有趣的事。不过巡警如果真的要撵你, 你怎么样?

L: Mi ne havas ideon antaŭ via alveno. Sed nun mi havas.

男 客 你没有来以前, 我不知道怎样。现在我有主意了。

N: Kion?

女 客 你预备怎样?

L: Mi forte batos la policanon ke li arestu min al la policejo. La mastrino luigos la apartamenton al vi. tiel ni ambaŭ havas loĝejon.

男 客 我把巡警痛打一顿, 让他把我带到巡警局里去, 叫房东把房子租给你。这样一来, 我们两个人就都有了住宿的地方。

N: Ne. (iom pensis)

女 客 那不行。(若有所思)

L: Kial ne?

男 客 那为甚么不行?

N: Vi ankoraŭ ne venĝis vin. --- Hej, mi ekhavas ideon.

女 客 你还是没有出那口气。——唉, 我倒有个主意。

L: Kiun ideon?

男 客 你有甚么主意?

N: (post momento) Mi estu via edzino, ĉu bone?

女 客 (少顿) 让我来做你的太太, 好不好?

L: Kio?

男 客 甚么？

N: Aĥ, ne timu tiel forte. Mi ne petas vian manon.

女 客 喔，你不用吓得那么样，我不是向你求婚。

L: Aĥ, vi miskomprenas min -- mi -- mi -- ĉar mi neniam pensis pri tio.

男 客 喔，你误会了我的意思，——我……我……因为我实在没有想到这个方法。

N: Tio estas la plej bona solvo. Ŝi rifuzis vin kun preteksto ke vi ne havas edzinon. Sed nun vi povas diri ke vi havas. kion ŝi ankoraŭ povas diri?

女 客 这是最妙的一个方法。她说你没有家眷同住，这房子就不能租给你。现在你说你有了家眷，看她还有甚么话说？

L: Certe nenion. Sed -- ĉu vi konsentas?

男 客 她一定没有话说。不过——你愿意么？

N: Kial ne? Kio domaĝas al vi?-- ĉar fakte mi ne estas via edzino.

女 客 我为甚么不愿意？这于我有甚么损害？——又不是真的做你的太太。

L: Aĥ, dankon !

男 客 喔，谢谢你！

N: Ne miskomprenu. Mi ne deziras ke mi havos domaĝon fariĝinte via edzino. jen tuta alia afero.

女 客 你不要把我意思弄错。我不是说做了你的太太，我就有甚么损害，那完全是另外一个问题。

L: Jes, tute alia afero. Tamen vi jam helpis min solvi la problemon de luigo. Mi devas danki vin.

男 客 是的，那完全是另外一个问题。不过你帮我把租房的这个问题解决了，我总应该向你道谢。

N: Ba! Dankon. Subpremate de la burĝaro, proletoj devas unuiĝi por rezisti ilin. (atente aŭskultante)

女 客 嗤！道谢，无产阶级的人，受了有产阶级的压迫，应当联合起来抵抗他们。（侧耳静听）

L: Prave, prave.

男 客 不错，不错。

N: Mi aŭdas parolon.

女 客 我听见有人说话。

L: Certe la policano! (urĝe) Ve, sed kiel mi povas klarigi, ĉar mi ja diris ke mi ne havas edzinon.

男 客 那一定是巡警！（急促的）唉，不过我已经说过我没有家眷

的，现在怎么对她们讲？

N: Diru, ke ni kverelis, vi rifuĝis, ne dezirante ke aliaj tion sciu...

女 客 就说我们吵了嘴，你是逃出来的，不愿意给人知道.....

L: (la policano jam venas al la pordo. Rapide kapbalancis, ke ŝi ne parolu) Ŝŝ!

男 客 (听到巡警已经走到门外，他急忙的点了一点头，叫她不要再讲话) 嘘！

(La luanto sidas ĉe la tablo ŝajnigante sin kolera. La luantino sidas ĉe la tetableto. La malantaŭa pordo estas puŝmalfermita, eniris policano kun ventrezista lampo en la mano. lin sekvas la servistino. Vidante virinon en la ĉambro, ili surpriziĝis. Vidante ilin, la virino stariĝis foje kaj afable salutis ilin. La policano metis la lampon sur la tablon, salutis al al kolera s-ro)

(男客人坐在方桌边，装作生气的样子。女客人坐在茶几旁边。后门由外推开，走进一个巡警，手里提了一个风灯，后面跟了老妈子和房东太太。她们看见房里来了一个女人，非常的惊讶。房里来的这个女人，见她们来了，起了一回身，向她们行了一个很谦和的礼。巡警将风灯放在桌上，与那位生气的先生行了一礼。

P: Ĉu mi povas scii vian familian nomon?

巡 警 您贵姓？

L: (neĝentile) Wu.

男 客 (不客气的)我姓吴。

P: (kapbalancis) Nu.-- kaj kie estas via hejmloko?

巡 警 (把头点了一点)喔。——府上是？

L: Hejmloko? Mi ne havas hejmlokon.

男 客 府上？我没有府上。

N: (komencis kiel ofendita edzino) Aĥ, vi decidis forlasi hejmon, ĉu?

女 客 (起始做起受了委屈的太太来)啊，你是拿定主意不要家了，是不是？

P: (rimarkinte la intervenantinon, al la s-ro) Kia estas la familia nomo de ĉi tiu...

巡 警 (注意到插嘴的人，向男客人)这位.....贵姓是？

L: (ne scipovas respondi. Ĵetis rigardon al la virino, kiu ankaŭ sentas embarason por li. Do li daŭrigis kiel kolera edzo) Mi ne scias! Vi demandu al ŝi mem !

男 客 (答不出，看了女客人一眼。女客也正在代他为难。他只好起始做起依旧赌气的丈夫来)我不知道。你问她自己好了。

P: (efektive turnis sin al ŝi) Kia estas via familia nomo?

巡 警 (真的问她自己) 您贵姓?

N: (Ĝojege) Mia? --- ankaŭ Wu.

女 客 (很高兴的) 我? 我.....也姓吴。

P: Ah, ankaŭ Wu.

巡 警 喔, 你也姓吴。

N: Jes.

女 客 是的。

P: (ne povante trovi alian parolon) Do via hejmloko ...

巡 警 (再也想不出别的话) 府上是?

N: Mia? Mi loĝas en la strateto Paco de Xisipailou (Ŝjisipajloŭ), Pekino, kontraŭ la Templo de Guan Yu, n-ro 375, mia telefonnumero estas 4692, (la okcidenta telefonejo) -- Ah, notu ĝin, alie vi forgesos.

女 客 我? 我住在北京西四牌楼太平胡同关帝庙对面, 门牌三百七十五号, 电话西局四千六百九十二。——啊, 你把它写下来吧, 等一会儿你一定要忘记。

P: (efektive prenis el sia poŝo notlibron) Pekino...(skribis)

巡 警 (真的摸出一本小簿子来) 北京..... (写字)

N: strateto Paco de Xisipailou (atendis, ke la policano skribu), kontraŭ la Templo de Guan Yu.

女 客 西四牌楼太平胡同, (让巡警写) 关帝庙对面。

P: n-ro?

巡 警 门牌多少?

N: 375, kaj telefonnumero 4--6--9--2, la okcidenta telefonejo.

女 客 三百七十五号。电话西局——四千——六百——九十二。

P: (finskribis) Dankon. (enmetis la notlibron en la poŝon, returnis sin al la luanto) vi venas lui la ĉambrojn, ĉu?

巡 警 (写完了) 谢谢您。(藏好了簿子, 又转向男客) 您是来这边租房的, 是不是?

L: Ne! Mi venas loĝi. La ĉambrojn mi luis jam delonge !

男 客 不是! 我是来这边住宿的。这房子我老早就租好了。

P: (embarasite. Ne povante daŭrigi la parolon. Li ree turnis sin al la virino) Vi venas por...

巡 警 (难住了。没有了办法, 又转向女客) 您是来这边?

N: Mi? Mi venas por serĉi homon.

女 客 我! 我是来这边找人的。

M: (ne povas resti pacienca) Kiun homon vi serĉas ĉi tie?

房 东 （不能再忍耐了）你到这边找什么人？

N: (Ĝentile kapbalancis al ŝi) Mi venas serĉi mian edzon.

女 客 （很客气的向她点了一点头）我到这边来找我的男人。

M: Vian edzon? Kiu estas via edzo?

房 东 找你的男人？谁是你的男人？

N: Mi opinias, ke vi scias -- ĉar vi ja luigis la apartamenton al li, ĉu?

女 客 我想你应该知道吧？——你既把房子都租了给他。

M: Kio? Tiu ĉi s-ro estas via edzo?

房 东 怎么！这位先生是你的男人么？

N: Mi ne scias. Vi demandu al li mem, rigardu, ĉu li konfesas?

女 客 我不知道。你问他好了，看他承认不承认？

S: (ankaŭ ne povas resti pacienca) S-ino ! Kio okazas ! Mi jam delonge diris al vi ke tiu ĉi s-ro certe havas edzinon, sed vi ne kredas.

老 妈 （也不能再忍耐了）太太，你看怎么样！我老早就对您说过，这位先生一定是有太太的，您不信。

P: (konfuziĝis) Kio? Ĵus vi diris, ke tiu ĉi s-ro ne havas edzinon, sed, kiel li havas nun la edzinon?

巡 警 （糊涂了）怎么？刚才你们不是说这位先生没有家眷，怎么现在他又有了家眷？

S: Ne estu stulta ! Antaŭ momento tiu ĉi s-ino ankoraŭ ne venis, kiel ni povus scii? Se tiu ĉi s-ino venis pli frue, mi ja evitis iradon en pluvo.

老 妈 不要糊涂吧，刚才这位太太还没来，我们怎么会知道？如果这位太太早来这里，还可以省了我在雨地里走一趟呢。

N: Pardonu. ne mia kulpo. Trajno de la 5-a horo, sed atingis nur je la sesa kaj duono.

女 客 对你不住。这实在不能怪我，五点钟的车子，六点半钟才到这里。

S: Ne miskomprenu. Mi parolas pri li senprudenta.

老 妈 请您不要多心。我不过是说他太不懂事。

P: Ho ni diru klare, via s-ino venigis min ĉi tien por tiu s-ro, kiu luis la tri ĉambrojn por loĝi sola, ĉar nur virinoj loĝas ĉi tie, do lia enloĝiĝo iom ĝenas. Nun se la s-ino de ĉi tiu s-ro jam venas, la afero fariĝas facila. Se la s-ino loĝas ĉi tie kune kun la s-ro, do nenio koncernas min, se la s-ino ne loĝas ĉi tie, do mi...

巡 警 这话可得要说明白了。太太要我到这边来，是说这位先生租

了三间房子，要一个人在这边住。这屋里住的都是常客，他先生一个人在这边住，很不方便，是那么个意思。现在这位先生的太太既是来了，这事就好办。如果太太是和先生在这边同住，那就没有我的事，如果太太不在这边住，这件事还得……

S: Ne diru sensencaĵon. La s-ino kompreneble loĝas ĉi tie, -- la afero estas tute klara -- la s-ro kaj s-ino iom kverelis pro bagatelo. Anstataŭ repacigo, vi diras tiel malprudentajn vortojn. Se ne ĉi tie, kie loĝu la s-ino? -- Nu, jam ne estas via afero. Rapide revenu al via maĝango-ludo (donis la lampon en lian manon) Iru ! Iru !

老 妈 不要瞎说吧。太太自然是在这边住。——一看还不知道——先生和太太不过是为了一点小事，闹了一点意见，你不来劝解劝解，还来说那样的话。太太不在这边住，到哪里住去？——好了，现在没有你的事了，你赶紧回去打你的牌去吧。（把风灯送到他手里）走！走！

P: Do, jam ne estas mia afero. Bone. Ĝis revido, ĝis !

巡 警 这样说，那就没有我的事了。好了，再见，再见。

N: Ĝis. Estu trankvila. Mi sciigos al vi okaze de mia foriro.

女 客 再见。你放心好了，哪一天我不在这里住的时候，我通知你就是了。

P: Pardonu mian ĝenon. Pardonu !

巡 警 对不起，打搅，打搅。

(Eliris la policano. Ĝojege eliris la servistino kun kruĉo. Konfesis sian malsukceson, la mastrino-luigantino ĵetis rigardon al la geluantoj, ankaŭ eliris kun seka mieno)

（巡警走出。老妈兴高采烈的拿了茶壶走出。房东太太承认了失败，看了她的客人一眼，也只好板了面孔走出）。

L: (Fermis la pordon. Ekmemorante demandon, kiun li jam delonge devis demandi, sed ĝis nun ankoraŭ ne demandis, li subite turnis sian kapon) Aĥ, kia estas via familia nomo?

男 客 （关上门，想起了一个老早就应该问而还没有问的问题，忽然转过头来）啊，你姓甚么？

N: Mi--aĥ--aĥ--mi--

女 客 我……啊……我……

(Falis la kurteno)

——闭 幕